

Sekso kaj Egaleco

Sendependa
bulteno

Informoj pri
virina agado

Numero 14

Oktobro 1986

Sekso kaj Reguleco

Kiam ajn *SkE* aparte malfruas, okazas poŝta katastrofo. La adres-etikedoj por n-ro 13 estis senditaj al la presejo en Belgujo de Dermot Quirke, kiu administras la adresliston. Sed pro poŝta striko en Belgujo, ili neniam alvenis. De nun, tamen, ni esperas ŝpari multe da tempo kaj nenecesa laboro, ĉar mi akiris komputilon kaj povos mem ĝisdatigi la adresaron.

Per komputilo oni povas ŝpari multe da tempo - sed eblas ankaŭ malŝparegi ĝin. Necesas eviti la emon sidi dum horoj antaŭ la magia ekrano, dum la infanoj desegnas sur la muroj kaj verŝas lakton sur la tapiŝon, luktante por solvi simplan problemon de la speco kiel centriĝi la titolojn...

Espereble la malfruo de *SkE* estas kompensata de ĝia pli bela aspekto. En la komenco, *SkE* estis tajpita kaj multobligita per stencilaj. De la pasinta numero, tamen, ĝi estas senpage kompostita de Dermot Quirke, kaj (bedaŭrinde *ne* senpage) presata de la Grafika Centro de UEA.

Estas klare, ke malgraŭ ĉiuj klopodoj, mi ne sukcesas revenigi *SkE* al la antaŭa kvar-monata ritmo. Mi do decidis rezigni pri tio, kaj oficialigi tion, kio jam praktike okazas, nome, ke ĝi aperas du-tri fojojn jare. Mi volas tamen memori miajn paciencajn abonantojn, ke tio ne influas la abonojn. Unu abonpago validas por kvar numeroj, kaj ne rilatas al la periodo dum kiu ili aperas. Kiam la abono finiĝos, vi ricevos memorigilon.

Anna Brennan

Sekso kaj Egaleco

Sendependa novaĵletero

Jarabono (4 numeroj):
16 ned. gld. aŭ 15 irk.

Respondkuponojn sendu rekte al Anna
Brennan, monpagojn al ŝia nederlanda
poŝtekkonto, n-ro 4412211.

Redaktoro
Anna Brennan
Colle Rasto
I-00039 Zagarolo
Italujo

Kunlaboris en ĉi tiu numero
Brian Holser
Dermod Quirke

Kompostis Dermod Quirke

PERANTOJ

Internacia (prezo: 16 ned.gld.): Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg
176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Poŝtekkonto 378964 (UEA). Banko: Mees
& Hoop, Coolsingel 93, 3012 EA Rotterdam (konto 25.52.89.804).

Brita (prezo: £4,00): Dermod Quirke, PO Box 14, Newark, Notts, NG24 4TP.
Poŝtekkonto 12 463 0006.

Franca (prezo: FF45,00): Anne Elise Ambles, 20 bis rue Censier, 75005 Paris.

Germana (prezo: DM14,00): VEJGA, Töpferstraße 20, 4500 Osnabrück.

Itala (prezo: Lit.9000): Anna Brennan, Colle Rasto, 00039 Zagarolo. (Nur por
italaj abonantoj; aliaj prefere pagu al ŝia nederlanda poŝtekkonto, aŭ al nacia
peranto).

Japana (prezo: ¥1500): Sei to Byodo Hakkokai, p/a Hukunaga Makiko, Maginu
1833-2-308, Miyamae-ku, Kawasaki-si, 213. Poŝta ĝirokonto 0-99911, Tōkyō.

Nederlanda (prezo: f16,00): Anna Brennan. Poŝtekkonto 4412211.

Norvega (prezo: Kr.40,00): Margrete Landmark, Torødveien 109, 3135 Torød.
Poŝtekkonto 5 73 61 29.


Sveda (prezo: Kr.40,00): Märtha Andréasson, Lilla Tolsered pl. 2265, 425 90
Hisingskärra. Poŝtekkonto 27 01 05-4880.

Usona (prezo: \$8,00): Charles Power, 1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA
90732.

Respondeca eldonanto (verantwoordelijke uitgever): Anne Tilmont, Nationalestraat 108, B-2000 Antwerpen

Demeti la kaptukon

Persanino



Mi lacigis tiel vivi en mia lando kun kaptuko kaj kovrilo, kaj esti sendefenda antaŭ ĉiu barbulo.

Mi ricevis mian pasporton kaj invitilon. Mi estis decidinta partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto. Mi aĉetis mian bileton kaj preparis mian valizon.

Ho, kiel agrable estis demeti la kaptukon kaj esti kiel mi volas. Por mi ne pasis longa tempo, ĝis mi aŭdis la voĉon de la piloto, kiu adiaŭis kaj anoncis alteriĝon.

Mia koresponda amiko atendis min en la flughaveno kaj gvidis min al la hotelo. Poste ni iris al la kongresejo. La kongreso devis komenciĝi la postan tagon.

Kiel pompa estis la inaŭguro de la kongreso! Poste ĉiuj partoprenantoj ekstaris kaj kunkantis la Himnon de Esperanto. Ankaŭ mi entuziasme komencis kanti:

En la mondon venis nova sento

Tra la mondo iras forta voko ...

Sed, ĉu mi ĝuste aŭdis? Ĉu la versoj estis ŝanĝitaj? Mi denove aŭskultis. La Himno estis tute ŝanĝita, sed la vortoj ne estis strangaj. Ho! Ve! Ĉi tiu ne estis la Himno de Esperanto sed la muezino de nia najbara moskeo, kiu alvokis al la preĝo. Li anoncis la komencon de nova tago kaj la saman koŝmaron kun kaptuko, kovrilo, barbuloj kaj sufoka vivo en mia lando, kiu iam nomigis Persujo.

La Ligo por la

Patrino Lakto



Anna Brennan, Italujo

En 1956, du virinoj en Ilinojso, Usono, partoprenis piknikon organizitan de ilia pregejo. Ili ambaŭ kunportis malgrandan bebon, kaj post la mango ili komencis mamnutri. Multaj aliaj virinoj envie rigardis ilin kaj komentis: "Ho, vi estas tre bonŝancaj, ke vi povas mem doni lakton al viaj beboj". Ĉiuj klarigis, ke ankaŭ ili volis mamnutri, sed ne povis pro diversaj kialoj.

La du virinoj, Mary White [*meri ŭajt*] kaj Marian Tompson, konstatis, ke multaj virinoj volus mamnutri, sed ne sukcesas pro manko de informoj. Ili decidis organizi grupon por helpi tiajn virinojn. Ili kontaktis kvin amikinojn, kiuj ankaŭ havis praktikan sperton pri mamnutrado - kio tiam ne estis tiel ofta en Usono. En la komenco, ili ne estis certaj precize kion fari, kaj decidis aranĝi diskutgrupon pri mamnutrado. En la unua kunveno ĉeestis la sep patrinoj kaj kvin gravedaj amikinoj. Ili ne aktive provis pligrandigi la grupon, kiun ili celis nur por konatoj, sed tre baldaŭ aliaj virinoj aŭdis pri la afero kaj komencis kontakti ilin. Post kelkaj monatoj jam 30 aŭ 40 virinoj volis partopreni la kunvenojn, kaj necesis formi duan grupon.

Tre rapide la afero kreskis, preter ia ajn imago de la sep fondintoj. Post iom da sperto, ili fiksis la enhavon de la kunvenoj, kaj faris serion de kvin kunvenoj (poste reduktitaj al kvar) pri difinitaj temoj por ĉiu nova grupo de patrinoj. En 1957 aperis la unua faldfolio, kaj en 1958 ili komencis eldoni revuon.

La novaĵo pri la grupo tre rapide disvastiĝis, sen konscia provo de la organizantoj. Nur unu jaron post la unua kunveno, ili jam ricevis 50 leterojn monate kaj multajn telefonvokojn de virinoj, kiuj bezonis konsilojn. Estis malfacile por ili plenumi ĉiujn petojn, ĉar ili mem havis junajn infanojn kaj estis tre okupataj pro siaj familioj. Ofte necesis ripetadi la samajn informojn, kaj tio donis al ili la ideon presigi libreton

pri mamnutrado. Dum la postaj kvin jaroj ili vendis 17 000 ekzemplerojn al virinoj tra la tuta Usono.

Artikoloj pri la ligo (kiun ili nomis La Leche League: "La Lakto-Ligo", aŭ simple LLL) komencis aperi en revuoj kaj ĵurnaloj. Tio pliigis la nombron da informpetoj, kaj en 1960, kvar jarojn post la fondiĝo, la Ligo ricevis proksimume 300 telefonvokojn kaj 400 leterojn monate. Kiam la internacie legata usona revuo *Reader's Digest* aperigis artikolon pri ĝi en 1963, alvenis pluraj miloj da informpetoj. La reago al tiu artikolo montris, ke virinoj efektive volis mamnutri, sed ne povis trovi la necesajn konsilojn. Tuj kiam aperis artikolo pri LLL alfluis lavango da leteroj.

La originala koncepto pri LLL kompreneble tute ne antaŭvidis tiel vastan intereson. En 1963 (eĉ antaŭ la apero de la artikolo en *Reader's Digest*) jam estis klare, ke la sep fondintoj kaj helpantoj ne plu povas persone respondi ĉiujn leterojn kaj telefonvokojn. Ili ja estis patrinoj kun junaj infanoj, kio signifis, ke ili ne havis multan liberan tempon. Iliaj amasiĝintaj dosieroj kaj librostokoj estis tenataj en dormoĉambroj, salonoj kaj garaĝoj. En tiu jaro ili dungis parttempan sekretarion kaj malfermis malgrandan oficejon.

De tiu komenco LLL, 30 jarojn post sia fondiĝo, nun fariĝis vasta organizaĵo kun preskaŭ 4000 grupoj en 44 landoj. Evidente la administrado devis kreski kun la asocio. Nun ĝi estas relative formala, kun estraro, komisionoj, direktoroj ktp. Tiu strukturo ne estis planata en la komenco, sed evoluis kiam aperis la bezono.

En 1956, apenaŭ ekzistis presita materialo pri mamnutrado. La fondintoj kolektis ĉion, kion ili povis trovi, kio tiam konsistis el mallongaj alineoj el medicinaj libroj kaj kelkaj artikoloj en revuoj. Ĉio estis tenata en kartona skatolo. Intertempe la situacio ŝanĝiĝis, kaj de tiam aperas multaj libroj, artikoloj kaj esploroj pri mamnutrado. LLL havas grandan bibliotekon, kiu estas verŝajne la plej granda tiutema kolekto en la mondo. Krome, ĝi mem eldonas librojn kaj flugfoliojn pri diversaj aspektoj de mamnutrado kaj kunligitaj temoj.

La bazo de ĝia agado estas la helpo inter patrinoj. Tio funkcias per regulaj kunvenoj (ekzemple, unu fojon monate) por gravedaj virinoj kaj patrinoj de junaj infanoj. La gvidanto de la grupo estas virino, kiu mem havas personan sperton pri mamnutrado. Grupgvidantoj ne havas apartajn kvalifikojn, sed antaŭ ol esti akceptitaj, ili devas multe legi pri la temo kaj korespondi kun reprezentanto de LLL.

Ĉu mamnutrado ne estas malpli konvena, ol doni lakton al bebo per botelo? LLL opinias, ke ne. Ĝi asertas, ke mamnutrado estas la plej simpla, natura kaj ekonomia maniero manĝigi bebon kaj ankaŭ kontentigas ŝi/liajn emociajn bezonojn. Kompreneble, neniu krom la patrino povas manĝigi la infanon, do kiam ŝi eliras, ŝi devas kunporti ŝi/lin, eĉ al aranĝoj, kie la ĉeesto de infanoj ne estas kutima. Tial LLL kuragiĝas patrinojn diskrete mamnutri en publikaj lokoj, kiam tio necesas.

Tamen estas malfacile por patrino mamnutri, se ŝi laboras ekster la hejmo. LLL donas konsilojn al virinoj, kiuj volas daŭrigi la mamnutradon kiam ili reiras al sia laboro, kvankam ĝenerale ĝi rekomendas, ke patrinoj de junaj infanoj restu hejme. Tiu solvo certe ne kontentigus la plimulton da feministoj, kaj LLL ne esploras la problemojn de virinoj, por kiuj la kariero gravas.

En sia libro *The Womanly Art of Breastfeeding* (La virina arto de mamnutrado), LLL proponas, ke virinoj laboru hejme por gajni monon aŭ portu la bebon al la laborejo, se la laborestro konsentas pri tio. (Tiaj solvoj estas verŝajne pli facile aranĝeblaj en Usono, kie ekzistas tre fleksebla laborsituacio). La libro ankaŭ tre pozitive aludas al, ekzemple, la italaj leĝoj, laŭ kiuj virinoj ricevas liberan tempon kun salajro pro nasko, kun garantio ke ili povos reiri al sia antaŭa posteno. Tamen, la libro ne evoluigas tiajn proponojn al pli profunda esploro de ilia signifo por la socio ĝenerale.

Se nur la patrino povas manĝigi la bebon, kio estas la rolo de la patro? LLL forte rekomendas la aktivan partoprenon de la patro en ĉiuj aliaj aspektoj de la prizorgado de bebo. Tamen ĝi emas reteni iom eksmodan bildon de la patro, kiu ludas kun la infanoj dum la patrino preparas la vespermanĝon, "helpas" la patrinojn, kaj portas hejmen la salajron.

LLL pruntas multajn ideojn de la antaŭindustriaj socioj. En la pasinteco, kaj ankoraŭ nun en multaj partoj de la mondo, patrinoj mamnutris ĝis la infano mem perdis intereson. Tio povis okazi kiam ŝi/li estis 2-, 3- aŭ eĉ 4-jara. (Kompreneble, en tiu kazo, la patrino lakto ne estis la sola manĝaĵo por la infano). En industriaj socioj, aliflanke, la patrino mem forigas la infanon de la mammo, kutime antaŭ la unua naskiĝtago. LLL kuragiĝas siajn membrojn mamnutri ĝis la bebo mem deziras ĉesi.

En neindustriaj socioj, bebo havas multe pli da fizika kontakto kun la patrino: ŝi/li dormas kun ŝi, aŭ kun ambaŭ gepatroj, kaj restas sur ŝia dorso dum la tago. Tio certe donas al la bebo senton de sekureco, kaj fakte

en afrikaj triboj, kie tiu kutimo estas la normo, oni tre malofte aŭdas plorantan bebon. Same LLL rekomendas, ke la gepatroj multe tenu novan bebon, portu ŝi/lin ĉe la korpo en portilo, kaj eĉ lasu ŝi/lin dormi en ilia lito. Ĉar beboj ofte vekigas dum la nokto, LLL asertas ke tio estas fakte pli



oportuna por la gepatroj, kiuj ne devas ellitigi por prizorgo ŝi/lin. La infano dormas pli profunde, kontenta pro la agrable fizika kontakto kun la gepatroj, kaj kiam ŝi/li bezonas lakton, la patrino povas mamnutri kuŝante en la lito.

Nuntempe mamnutrado, kiu preskaŭ malaperis en la industriaj socioj, repopulariĝis. Kuracistoj kaj pediatroj, kiuj en la pasinteco malhelpis ĝin per miskonsiloj, denove rekonas ĝiajn avantaĝojn kaj lernas la ĝustajn

procedurojn por sukcesa mamnutrado - almenaŭ en kelkaj landoj. Tamen, en multaj landoj, la situacio ankoraŭ ne estas kontentiga.

Dum tiu unua kunveno en 1956, la sep fondintoj neniam imagis, ke ili ĉeestas la naskon de vasta movado. Ĝi atingis sian pinton en 1979, kiam estis preskaŭ 4400 grupoj en 43 landoj (plejparte tamen en Usono). Post tio estis ioma malkresko al 3800 grupoj en 1984. Tiu refalo verŝajne suldigas guste al la sukceso de la movado. Nuntempe virino, kiu deziras mamnutri, povas ricevi helpon kaj informojn de multaj fontoj, kaj ne nepre devas aliĝi al grupo de LLL. Tiu ŝajna malsukceso de LLL post 1979 povas do esti interpretata kiel signo de ĝia sukceso.



En *SkE* n-roj 11-13 aperis plurparta serio kun la titolo "Patrineco kaj profesio: ĉu la kombino eblas?". Reage al la artikolo de Virge Hallop pri la situacio en Estonujo, kiu aperis en n-ro 11, Lembe Laanest aldonis pliajn pensojn en privata letero al Anna Brennan. Resume sekvas kelkaj el la punktoj el tiu letero.

Dum la diskuto en Estonujo pri projekto de nova konstitucio, unu el la proponoj estis, ke oni havu la eblecon resti hejme pli longe kun

malgrandaj infanoj. Por la ŝtato, tio estas pli ekonomia solvo ol pagi lokojn en infanvartejo. Tamen patrinoj volas fari tion nur provizore: ili ne deziras tute forlasi sian eksterhejman laboron.

En Estonujo 54% de la laboristaro (en la plej larĝa senco) estas virinoj. Statistiko montris, ke kiam virinoj dum ioma tempo lasas sian salajratan laboron, tio preskaŭ ĉiam estas pro familiaj kaŭzoj: nasko (64%), propra malsano aŭ malsano de infanoj (10%) kaj troa laborŝarĝo pro granda familio (8%).

Patrinoj havas duoblan ŝarĝon ne nur fizike sed ankaŭ mense. Ili ne nur dediĉas ĉiun liberan minuton al sia familio, sed pensas pri hejmaj problemoj ofte ankaŭ dum laboro. Sed por progresi en sia fako, necesas fari ĝuste la malon: t.e. okupiĝi pri ĝi ankaŭ dum libera tempo.

La plejmulto de la medicina personaro estas virinoj. Ĉiuj kuracistoj estas regule sendataj al perfektigaj kursoj en Moskvo, Leningrado kaj aliaj ĉefaj centroj. Sed virinoj pro familiaj kaŭzoj kutime elektas la malpli longajn kursojn (de 1-2 monatoj anstataŭ 4 monatoj), kio malhelpas ilin atingi la supron de sia fako.

Eksterhejma laboro estas grava al la homo ne nur pro financaj kaŭzoj: ĝi donas senton de kontentigo, rekono ktp. Mastrumado de hejmo, aliflanke, estas tre nekontentiga laboro, kiun oni devas konstante ripeti sen vidi evidentajn rezultojn. Ĝi postulas tre multan tempon, sed estas malalte taksata. Tial en Estonujo la plej aktuala problemo ĉiunivele, de la registaro ĝis ĉiu aparta familio, estas malpliigo de la hejma laboro. **ab**

Amuzis min legi en numero 12 de *SkE* miajn rimarkojn pri la onta patro, kiu planis varti mem sian bebon, por ke la patrino daŭrigu sian profesion laboron.

Mi ne scias, ĉu mi prave suspektis, ke li "ne plene komprenas kiom da laboro postulas eĉ novnaskito", sed mi ja ne devis timi, "ke mankos la 'am-etoso' ĉirkaŭ la infano"! Kun plezuro mi raportas, ke la atendita bebo estas nun fortika, ĉarma, parolema, amikema kaj evidente feliĉa knabineto, preskaŭ trijaraga kaj tre-tre amata.

Sen troo da efikeco, ŝia patro organizis la tagon laŭ la bezonoj de juna infano. Dum li ankoraŭ studis li tion faris ĉefe vespere, kiam ŝi dormis.

Poste la gepatroj sukcesis tiel organizi sian familian vivon, ke ambaŭ povas labori ekster la hejmo, laŭvice, ne samtempe, kaj la filineto ĝuas la avantaĝojn koni ambaŭ gepatrojn egale, kiel prizorgantojn kaj kunulojn. Ŝi estas pli memstara ol multaj samaĝuloj, flue parolas kaj memfide kondutas inter homoj ĉu konataj ĉu ne.

Lastatempe la familio transloĝiĝis, kaj mi ne dubas, ke la juna Maajke same facile kiel la gepatroj orientiĝos en la novaj hejmo kaj socio.

Audrey Childs-Mee [odri ĉajldz mi], Nederlando

Mi dezirus alporti akvon al la muelilo de nia samideano C. Piron, kiu skribis en n-ro 12 de *SkE* pri pronomoj por maldistingi la seksojn; por precizigi la viran sekson, li proponas aldonon de speciala nova sufikso *-us*.

Mi estas tre interesata pri tiu afero, ĉar ni renkontis similan problemon en nia grupo Universala Gefrata Oriento. Jam en la titolo mem de nia asocio ni uzas la vorton "Gefrata", ĉar ĉe ni neniuj diferencoj devas ekzisti inter la membroj de la grupo, kiuj estas aŭ fratoj aŭ fratinoj, ĉar ni precipe kunigas en *universala* asocio.

Kelkaj samideanoj, al kiuj ni proponis labori kun ni, multe protestis kontraŭ tiu malkonforma uzo de *ge-* kaj parolis kontraŭ tiu nebona uzo de sufikso jam ekzistanta en la Fundamento kun alia senco, ĉar *ge-* signifus paron aŭ pliajn personojn de ambaŭ seksoj. Ni ne nur en adjektivoj uzas tiun sufikson sed ankaŭ en substantivoj; ni ne nur diras "gefratoj" sed ankaŭ "gefrato", kiam ni alparolas iuseksan membron de nia asocio. Ni ankaŭ uzas ĝin en titoloj: *gemoŝto* kaj *gevakto*, ktp...

Do, ni tamen konservas tiun nommanieron. Ĝi plaĉas al ni!

Ja se vi volas paroli pri ago, kiun vi faras kiel "gepatro" de lernejoj, vi bezonas tian uzon de *ge-*, aŭ se ne, kiel diri tion?

Same, kiel pronomon por maldistingi la seksojn, mi proponus anstataŭ "ĝi" uzi novaĵon: "ĝi". Kial ne diri: "la sekretario, ĝi...?"

La problemon de seksa lingvo ne konis Zamenhof kiam li kreis nian lingvon, same kiel li ne konis informatikon. Ĉu ni ne devas krei novajn vortojn por nova afero?

Paul Touron [pol turo'], Francujo

Antaŭnelonga numero de *SkE* (n-ro 12) enhavis tre legindan artikolon de Claude Piron pri la seksa lingvo-problemo rilate al Esperantaj pronomoj kaj sufiksoj. Tiuj, kiuj la kompletajn argumentojn de s-ro Piron volas esplori, nature devas legi la artikolon mem, sed por resumi:

Kion devus oni diri anstataŭ *li* aŭ *ŝi*, se oni ne volas precizigi sekson? Unu propono (antaŭe preferita de Piron) estas la nova senseksa pronomo *zi*: "Kiam mi vidis la personon, *zi* forkuris". Piron nun trovas la pronomon *zi* tro "artefarita" por enradikiĝi en Esperanto. Li nun preferas novan regulon ol novan vorton: *ŝi* estu virina, *li* neŭtra, kaj (mi citas) "la kompatindaj viroj ne ricevis specialan pronomon. Manke de tiu distingo, oni uzas pri ili la ĝeneralan pronomon *li*". Tiu stranga redifino interne de la nuna pronomsistemo devus kontentigi la feministojn, ĉar la diskriminacioj estus subite la viroj. Ĉu mi unikas, se mi trovas ĉi tiun regulon multe pli artefarita ol la novan radikon? (Kiel "pruvon", ke *li* jam estas senseksa, Piron asertas, ke Dio nomiĝas *li* en la Biblio kaj ke ĉiuj scias, ke Dio ne havas sekson. Sed mi konas multe da feministojn, kiuj argumentadas, ke la konvencia juda-kristana dio estas efektive vira kaj eĉ patriarkaĉa dio precize ĉar li ade nomiĝas *li*!).

Rilate al sufiksoj, Piron klarigas la proponon, ke Esperanto bezonas viran sufikson konforman al la virnina *in*; el multaj sugestoj, Piron preferas *us*. Tiel *instruisto* sekse neprecizigata, *instruistino* specife virina kaj *instruistuso* specife vira. Ĉar multaj Esperantistoj jam kutime diras *instruisto* anstataŭ *geinstruisto* por aludi al persono eble vira kaj eble virina, ĉi tiu solvo ŝajnas supraĵe tre simpla. Sed kiel Piron klarigas, ĝi estas efektive tre malsimpla: ĉu ŝanĝiĝus ankaŭ la signifo de *patro*, *frato*, *edzo* kaj eĉ *viro* mem? Psikologie, ĉi tio rilatas al vortoj tre forte ligitaj kun la vireco, situacio kiu eble maljustas sed ne ŝanĝiĝos rapide. Piron pravas, ke ne nur temas pri aldono al la lingvo, sed subtila kaj fundamenta ŝanĝo de la lingvo. Ĉu ne suferus la interkompreno dum la ŝanĝado?

Anstataŭe proponas Piron kompleksan aron da kompromisoj, similaj al la seksaj kompromisoj de diversaj naciaj lingvoj: *instruisto* estus neŭtra, *instruistino* kaj *vira instruisto* specifaj; *patro*, *frato* kaj aliaj familiovortoj restus baze viraj; ktp. Tio ĉi konformas al la nuna kutimo de multaj neseksismaj Esperantistoj kaj pro motivoj de malriskemo verŝajne preferindas ol la pli radikala radiko *us*.

Tamen, mi trovas la proponitan pronomon *zi* tre inda kaj esperas, ke almenaŭ la feministaj eldonaĵoj kiel *Sekso kaj Egaleco* serioze eksperimentos ĝian uzadon.

Herbert Ashe [aŝ], Usono

Antaŭen kaj...

PREZIDANTINO EN FRANCUJO

Plia landa asocio de UEA havas inan prezidanton. Unuigo Franca por Esperanto, ŝajne la unuan fojon en sia multjara ekzisto, elektis al la pinto de la acocio virinon: Renée Triolle. La funkcio de ĝenerala sekretario, male, estas tradicie plenumata de ino: dum la lastaj 15 jaroj sinsekve tenis ĝin virinoj (J. Vincent, C. Nourmont, R. Triolle kaj denove C. Nourmont).

La virinoj tamen esperas, ke ne pro ineco oni elektis ilin, sed pro laboremo kaj kompetento!

RIFUGINTOJ

La plimulto da rifugintoj estas virinoj kaj infanoj. En multaj situacioj, viraj rifugintoj ne plu povas plenumi sian antaŭan okupon, dum aliflanke la virinoj havas multe pli da laboro ol normale. Ili ankoraŭ respondecas pri ĉiuj domtaskoj. En regionoj, kie apenaŭ pluvus, ili bezonas multe da tempo por trovi brulmaterialon kaj porti akvon.

Pro diversaj kialoj, pli da infanoj naskiĝas en tendetoj ol en tradicia medio. La patrinoj, tamen, estas ofte tro malsanaj aŭ fizike elĉerpitaj por naski sekure, provizi sufiĉe da lakto por suĉinfanoj aŭ estri multnombrian familion.

En kelkaj regionoj, virinoj ne rajtas

partopreni edukprogramojn, kaj tio kontribuas al ilia malavantaĝa pozicio. La Ĉefkomisiono por Rifugintoj de UN strebas, por ke knabinoj ĉeestu la lernejojn en tendetoj kaj aliaj centroj. Kulturaj baroj ankaŭ malhelpas virinojn ricevi kuracadon.

Virinoj estas en aparta danĝero pro seksa mistraktado. Inter 1980 kaj 1985, 2400 virinoj estis atencitaj de piratoj dum ili fuĝis en malgrandaj boatoj sur la Suda Ĉina Maro. 1000 virinoj estis forrabitaj, kaj malpli ol duono de ili estis retrovitaj. Ankaŭ en tendetoj kaj ĉe landlimoj estas multaj kazoj de seksperforto.


TEATRO

Studo pri la teatra publiko en Tallinn, Estonujo, montris, ke ĝenerale virinoj pli ofte vizitas teatron ol viroj (la proporcio estas 2:1). Inter multaj demandoj estas ĉi tiu: se vi efektive volus pli ofte viziti teatron (tion volis preskaŭ ĉiuj demanditoj), kiuj estas la kaŭzoj, kiuj tion malebligas? La kaŭzoj: infanoj - por virinoj 28%, por viroj nur 19%; hejmaj laboroj - respektive 25% kaj 13%. Post sia eksterhejma laboro kaj vesperaj hejmaj taskoj, virinoj estas ankaŭ pli lacaj kaj eĉ ne volas en tia elĉerpita stato iri en teatron. La trian lokon okupis efektive laciĝo por virinoj, sed por viroj - aliaj interesoj.

VIRINOJ KAJ MUZIKO

Kion virinoj faris por la muziko? La plejmulto el ni verŝajne supozus, ke virinoj historie ne ludis gravan rolon.

Tamen, eĉ en la pasinteco, virinoj estis multe pli aktivaj muzike ol oni kutime memoras. La Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj ĵus eldonis suplementon (n-ro 22) al sia regula eldonaĵo *Virinoj de Eŭropo*, kun la titolo "Virinoj kaj muziko". Ĝi enhavas mallongan studon pri la kontribuo de virinoj al la muziko de Eŭropo. Ĝi komenciĝas per 18-paĝa historia enkonduko, kiu montras la



partoprenon de virinoj en ĉiu kampo de la muziko: kiel verkistoj, ludistoj, instruistoj, muzikologoj, faristoj de instrumentoj, direktoroj de teatroj, dirigentoj, eldonistoj, dancistoj, kantistoj ktp. Sekvas mallonga biografia indekso, kun resumaj detaloj pri la vivo de pli ol 80 muzikistinoj, kiuj estis bone konataj en sia propra periodo kaj ankaŭ grave kontribuis al la historio de la muziko. Muzikistinoj estas listigitaj el Eŭropo, Usono kaj la Mez-Oriento. Laste estas ĝenerala bibliografio kaj listo de diskoj.

La suplemento estas senpage ricevebla en ĉiuj lingvoj de la eŭropa komunumo de Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj, Rue de la Loi 200, B-1049 Bruselo, Belgujo.

HARLEM GLOBETROTTERS

La mondfama usona teamo de korbopilko, Harlem Globetrotters, havas unu virinan membron. Lynette

Woodard [linet' iŭdard] aliĝis al la teamo en 1985, kiam oni decidis varbi ankaŭ inter virinoj. Ŝi estis elektita el 18 virinoj, ĉiuj elstaraj ludistoj. Woodard mem jam ludis en la usona olimpia teamo en 1980 kaj denove en 1984, kiam ŝi estis teamestro. Dum unu jaro en 1981, ŝi ludis por itala teamo, sed tio estis streĉa sperto por ŝi, ĉar ŝi ne parolis la italan kaj ŝiaj kunludantoj ne parolis la anglan. Ŝi ankaŭ dum pluraj jaroj ludis por la usona nacia teamo, antaŭ ol aliĝi al Harlem Globetrotters. Ŝia antaŭa trejnisto (ankaŭ virino) diras, ke Woodard ne faras unu aferon elstarege, sed faras multaj elstare.

KOMISIONO POR EGALECO

Instruistinoj de la universitato de Kopenhago starigis komisionon por egaleco en 1983. La universitato havas 25 000 studentojn kaj 3 000 lekciistojn.

La plejmulto da studentinoj estas en la fakoj de teologio kaj humanismaj studoj. 46% de studentoj de juro estas virinoj, sed nur 26% de la sciencaj studentoj. Nur 4% de la lekciistoj estas virinoj. La studgrupo pri egaleco daŭrigas sian klopodon plibonigi la situacion.

Informojn provizis: Claude Nourmont [klod nurmo], Luksemburgo; *Refugees* junio 85; Lembe Laanest, Estonujo; *Women of Europe* n-ro 42 kaj supl. 22; *Ms* januaro 86.

...malantaŭen

Pago por virino

François [frasūa] Akpa, Benino

Kiam oni aŭdas la vorton doto, oni emas pensi pri la pago, kiun la familio de la fianĉino pagas al ŝia estonta edzo. Sed ekzistas lokoj, kie la situacio estas tute inversa: tie la estonta edzo pagas al la familio de la virino, kun kiu li deziras edziĝi. Tia situacio estas priskribita en la suba artikolo.

Kiel tia pago influas la situacion de la virino? Je la unua vido, oni eble emus rigardi ĝin negative: ŝajnas kvazaŭ la junulino estas varo, kiun ŝia estonta edzo "aĉetas" de la gepatroj. Ni notu, tamen, ke por la gepatroj tio almenaŭ igas la filinojn tre valora kaj havinda varo. Cetere, kiel vi legos en la suba artikolo, la fianĉo devas doni valoraĵojn ankaŭ al la estonta edzino. Male, en landoj kie la gepatroj devas pagi doton al la edzo, ili ofte konsideras la filinojn nedezirata ŝarĝo.

En la kamparaj lokoj en Benino, ofte amikeco naskiĝas kiam junulo, vidante junulinon en la vendejo aŭ en la strato, ĉe la puto aŭ dum longa vojaĝo, salutas ŝin tutkore. Kutime, salutante ŝin li diras: "Mia tre estimata amikino, kiel vi fartas? Kiel vi nomiĝas?"

Poste li diras al ŝi, ke li amas ŝin tre multe kaj demandas, "Ĉu estas eble ke mi edziĝu kun vi?" Ofte la virino ne konsentas tuj, sed ridetas kaj prokrastas la respondon ĝis alia tago. Ili fiksas rendezuon kaj se la du homoj havas la saman opinion, ili renkontiĝas, sed se la junulino ne konsentas, ŝi ne alvenas.

En tiu ĉi kazo, ŝi alvenas. Dum la konversacio, la junulo trudiĝas kaj diras al ŝi, ke li edziĝos kun ŝi; tie naskiĝas tio, kion oni nomas "amo". Poste estas la periodo de rendezuoj.

Post kelkaj monatoj, la junulo prezentas sin al la estontaj bogepatroj, alportante du botelojn da *sodabi* (populara alkohola trinkaĵo en Benino), kaj petas la rajton edziĝi kun ilia filino. La estontaj bogepatroj diras, ke ili devos paroli kun sia filino kaj ekscii ŝian opinion, antaŭ ol decidi.

Dum tiu periodo la junulo komencas havi seksajn rilatojn kun la junulino. La amikeco daŭras, daŭras, almenaŭ du jarojn aŭ pli. Poste, la junulo diras al sia estonta edzino, ke denove li kontaktos ŝiajn gepatrojn pri la aĵoj, kiujn li devos donaci antaŭ la edzigo. La junulino arangas por li novan daton revidi ŝiajn gepatrojn. Poste, ŝia tuta familio kunvenas por paroli pri tiu ĉi afero.



Dum la kunveno, la familio decidas, ke ĝi deziras ricevi de la junulo sumon ekvivalentan al 3200 frankoj francaj, kaj ke la junulino mem devas ricevi sumon ekvivalentan al 800 francaj frankoj, plus dudek kvar mezurojn da faruno el manioko, dudek kvar mezurojn da fazeoloj, grandan kvanton da salo, pakojn da sukero, orelingojn, ĉenojn, piedvestojn, kalsonojn, koltukojn, ktp.



La junulo reiras hejmen tute meditema kaj pensema. Li disponas pri du aŭ tri monatojn por pagi ĉion. Poste, la estontaj bogepatroj postulas pliajn aĵojn: di ŝafojn, ok kokojn kaj kvar kokinojn, grandan kvanton da fiŝoj. La estonta bofilo petas ilin iom redukti la pagon, kaj tuj ili respondas, ke se li ne konsentas, li povas lasi ilian knabinon. Post kelkaj tagoj, la junulo vizitas siajn proprajn gepatrojn, kiuj donas tuj al li grandan palmaron kaj parcelojn. Li povas vendi ilin por pagi la grandan doton.

Post kelkaj semajnoj la junulo sendas al la estontaj bogepatroj amikojn kaj parencojn por transdoni la aĵojn. De kiam ili ricevas la aĵojn, tre ĝojaj, ili

anoncas la daton por la eltiro de la junulino. Dum tiu tago la junulo sendas alian grupon da personoj por venigi sin. Kiam la novedzino iras al la domo de sia edzo, lia tuta familio ĉeestas kaj ĝoje festas.

Tamen post la sendo de ĉiuj aĵoj al la bogepatroj, foje okazas, ke la edzo malriĉiĝas. Tial la virino povas ankaŭ forlasi lian domon, kvankam li elspezis tiom multe. Do, por viroj kiuj loĝas en la kamparo, por havi nur



unu virinon, necesas elspezi multe da mono. Nur en la urbo Kotonuo estas escepto, ĉar tie estas multaj virinoj sen viroj. Sed ĉi tie necesas havi multe da mono antaŭ ol esti plejamata kaj karega.

Aliflanke, troviĝas aliaj homoj kiuj havas ĝis kvin aŭ ses edzinojn. Jen tio, kio kaŭzas la altajn dotojn: "La konkursado por la virino", kompreneble per la mono.



Preskaŭ ĉie en Afriko estas la sama afero. Ekzemple en Nigerio la situacio estas pli malbona ol en Benino. Kelkloke en Norda Afriko, estas la personinterŝanĝo anstataŭ pagi la grandan doton. En partoj de Azio, la viroj ne trovas edzinojn, dum aliloke en la sama Azio la virinoj urĝe serĉas edzojn.

Ĉu viro ne rajtas havi edzinon pro la alta doto? Efektive, pro tio multe da viroj vivas nuntempe sen virinoj. Ni rekonu en la nomo de la tuta homaro ke la virino estas ĉiam necesa por la viro ĉie. Sen la virino, nenio estas ebla kaj la vivo de la viro dependas de tiu de la virino.

Kunvenoj por virinoj

Sally Phillips [*sali filips*]
Britujo

Ni postulos pli grandan ĉambrom venontjare por la kunvenoj pri virina agado. En tiu plenstopita ĉambro estis apenaŭ eble eĉ spiri! Tio tamen ne malhelpis al diskutado kaj ŝprucado de ideoj kaj planoj.

Post la ĝenerala kunveno estis seminario pri publika parolado, kun bonegaj, klaraj, helpemaj prezentoj de Belka Beleva, Märtha Andréasson kaj Anna Brennan. Estis malfacile konvinki la aŭskultemulojn, ke la seminario celas nur partoprenantojn. Eble la timemuloj devus havi permeson resti dum la prelego kaj foriri antaŭ la ĝenerala partoprenado.

Ĉiuj seminarianoj havis la eblecon (kaj devon) pretigi kaj prezenti paroladeton laŭ la konsiloj ĵus donitaj. Tiu ekzercado estis tre sukcesa kaj ĉiuj prelegetoj estis aŭskultindaj. Krome estis interese noti, ĉu la konsiloj estis adoptitaj. Post taksado de ĉiu prelegeto, ĉiu devis fari duan provon. Ni estis tre kontentaj pro la seminario, kaj ĉiuj deziris ripeti ĝin en alia kongreso.

Kiel varbi malpli spertajn virinojn, tamen? Dum la sinprezentoj, oni malkaŝis tiom da talentoj kaj tiom da interesaj laboroj faritaj de la virinoj, ke mi sentis mankon de vendistoj, fabrik-laboristoj, senlaboruloj ktp.

Ni havas forton. Ni devas ampleksiĝi por esti pli valora grupo.

Maltrankvila vojo

Vera Simeonova, Bulgarujo

Unu el la pioniroj de la korĥirurgio en Bulgario, ŝi kontribuis multe por tiu malfacila sfero de la medicino. Komencinte kiel help-kuracistino, Lada Marinova paŝis la enhavoriĉan vojon de la kuracisto, de la sciencisto. Ŝi faris multnombrajn malsimplajn operaciojn kaj helpis al multaj homoj kun malsanaj koroj. Ŝiaj sciencaj referaĵoj estis pli ol 45. Ŝi partoprenis

diversajn konferencojn, simpoziojn, kongresojn - en Bulgario kaj eksterlande.

Antaŭnelonge mi demandis ŝin: "Se vi devus denove elekti vojon en la vivo, kien vi ekmarŝus?". Ĉu ja estis konvena tiu demando! Ju pli altajn suprojn atingas la homo, des pli senlimaj horizontoj malkovriĝas antaŭ li. Ŝi pensas, ke ŝi ankoraŭ ne donis sufiĉe por la homoj.

D-ino Marinova rememoras: "... Estis leciono pri literaturo. La lernantino finis sian referaĵon tiamaniere: Emancipita kaj egalrajta ne estas nur la virino, kiu vestas sin moderne kaj tenas cigaredon en la mano, sed la virino, kiu ne timas eniri la plej malfacilan sferon de la vivo, kie ŝi kontribuos helpon al la socio".

Okcidente malaperis la flamoj de la Dua Mondmilito. La juna kuracistino estis volontulino en la Liberiga Armeo. Ŝia batalbapto komenciĝis guste en



la Unua Ĥirurgia Hospitalo. Alvenis la severe vunditaj homoj - difektitaj, kriplitaj. Ŝi devis restarigi, returni ilin al la vivo. La vunditaj batalantoj ekamis la junan helpantinon. Ili admiris la rideton de ŝiaj bluaj okuloj, samtempe severaj kaj teneraj.

Poste la memoro kondukas ŝin al la vilaĝo, kie ŝi estis regiona kuracistino. Tio estis en la pasinteco - ŝi renkontis antaŭjuĝojn, postrestintajn ideojn.

Sed ŝi devis venki la malfacilaĵojn kaj gajni la amon kaj estimon de la homoj.

Post jaroj la kandidato de la medicinaj sciencoj reiras al siaj unuaj paŝoj por regajni obstinon, volon kaj moralecon. Estas konate, ke la homoj hardiĝas en malfeliĉo kaj elprovado.


Nun la ĉiutaga vivo de d-ino Marinova estas riĉa, plena je multaj agadoj: operaciado, instruado al studentoj-medicinistoj, okupo pri sociala laboro k.a. Ŝi senĉese legas, perfektigas, ĉar ŝi scias, ke por atingi ion grandegan en la koro-sangodukta ĥirurgio, necesas multaj scioj kaj praktika sperto.

Tia estas ŝia vivo - maltrankvila kaj dediĉita al la homoj.

Ne-fikcie

Homo kaj maŝino

Ĉapitro: Ino kaj maŝino



Claude Nourmont [*klod nurmo'*], Luksemburgo

- *Bonan tagon. Ĉi tie la franca Ambassadejo.*
- Bonan tagon. Bonvolu min konekti kun S-ino Ipsilon.
- *Bedaŭrinde ŝi ne ĉeestas.*
- Nu, mi klarigu la aferon: mi ricevis poŝtkarton, ke mi telefonu al la Ambassadejo pri afero, kiu koncernas min - kun mencio, ke mi kontaktu tiun oficistinon.
- *Nu, pri kio temas?*
- Mi fakte ne scias. Cetere mi ricevis la karton je la nomo MOON, kaj mi ne nomiĝas MOON, mi nomiĝas NOURMONT.
- *Do, verŝajne temas pri tio! Mi prenos la dosieron.* [Post iom da tempo:] *Vi ne estas registrita por balotoj en Francio.*
- Tamen mi jes havas la legitimilon por voĉdoni ĉe la komunumaj kaj lokaj balotoj en Aix-en-Provence!
- *Sed laŭ la komputilo vi ne estas registrita.*
- Tamen mi jes voĉdonas en Francio, sed mia nomo estas NOURMONT, ne MOON, kaj tio estas tute laŭleĝa. La Ministerio pri Virinaj Aferoj eĉ eldonis tutan libreton pri la rajtoj de la virinoj - kiu ĝuste estas disdonata ĉe la Ambassadejo - kaj kiu interalie mencias la absolutan rajton de la virino

konservi la propran denaskan nomon post edziniĝo.

- Sed la komputilo aŭtomate serĉas la nomon MOON, kaj ĝi ne ĉeestas. Do vi ne povas esti registrita.

- Sed estas mia rajto uzi mian propran originan nomon. Mi neniel devas preni la nomon de mia edzo, tio en Francio estas nur kutimo, ne devigo.

- Certe, sed la komputilo estas programita tiel, ke ĝi serĉas la nomon MOON, la nomon de via edzo.

- Sed, komprenu, ke ne mi devas adaptiĝi al la komputilo - sed oni devas aliel programi la komputilon! Ne mi devas submetiĝi al la komputilo, sed ĝi devas submetiĝi al la leĝoj kaj al la rajtoj de la civitanoj!

Post ankoraŭ iomege da klarigoj, la alparolato fine konsentis, ke nu, certe eblus aliel programi la komputilon. Intertempe mi ricevis neniun korespondaĵon de la ambasadejo, nek je unu nomo, nek je la alia - sed jes el Francio la novan legitimilon por voĉdoni - sub mia propra origina nomo...

Feminismo en 1908

"Esperanto! Feminismo! du sensecaĵoj - kiel iuj pensas - du ideoj abstraktaj, neelpensenblaj; du idealoj de varmegaj pensorganoj, de nervmalsanaj cerboj, de poetaj fantazioj!"

Tio estis la verva komenco de artikolo en *Roma esperantisto*, verkita de Giacinta [*ĝaĉinta*] Fabbri en julio 1908. Ŝi certigas la legantojn, ke malgraŭ la misopinioj de kontraŭuloj, Esperanto kaj feminismo "montras du grandajn sociajn ideojn, nuntempe senkvietigantajn la homaron kaj disvastigantajn tra la tuta mondo".

Kopio de tiu artikolo estis sendita al *SkE* de Michela [*mikela*] Lipari. Kiel la supraj eltiraĵoj montras, la stilo estas sufiĉe peza laŭ nuntempaj kutimoj, do mi mallonge resumas la enhavon prefere ol represi la tuton.

La verkinto verŝajne ne estis en la avangardo de la tiutempa virina movado, ĉar ŝi klarigas, ke ŝi malaprobas la feminismon "se oni volas ke ĝi enhavu ian revolucion senton, ian libervolan cedon de niaj devoj kaj de niaj proprajoj". Ŝi ne volis cedi "la sanktajn ĝojojn de la familio", nek "egaligi al la viroj kaj uzurpi iliajn rajtojn".

Por ŝi la feminismo signifas "la edukadon de la virina animo, starantan sur firmaj bazoj religiaj kaj civilaj, kaj sur la kono de la moderna evolucio".

Si demandas, “Ĉu ne estas la virino tiu, kiu devas eduki la homaron? Kaj la estonto de la nacioj ĉu ne estas en la manoj de l'virino? Kiaj estos la filoj de virinoj senreligiaj, malkleraj, senbonmoraj, senkonsciaj?”.

Do, Fabbri certe ne aprobis por virinoj iun ajn paŝon el la tradicia rolo de patrino. Por ŝi la feminismo ŝajne limiĝis al pledo por eduko, kvankam laŭ ŝia priskribo, ŝi interesiĝis pli pri morala ol pri intelekta eduko. Unu ero el tiu edukprogramo, cetere, devas esti Esperanto, supozeble por ke virinoj povu transdoni ĝiajn valorojn al siaj gefiloj.



Fabbri ankaŭ asertas, ke laŭ ŝi feminismo signifas “la forigon de tiuj malvastegaj ideoj, de tiuj fatalaj antaŭjuĝoj, kiuj malsuprenigis ŝian indecon [de la virino] kaj aŭtomatigis ŝin”, sed bedaŭrinde ŝi ne pli evoluigas tiun argumenton.

Kiel feminismo, Esperanto ne celas “renverson kaj revolucion”. Fabbri komparas ĝian konsolan rolon kun tiu de la patrino: “[la homo], estante en fremda lando aŭ inter diversnaciaj personoj, kiam li sentas sin tute sola kaj ne scias per kiu li povos sin komprenigi, li sin turnas al la verda stelo esperanta, kaj de ĝi ricevas helpon kaj konsolon”.

Kaj do, konkludas Fabbri, se feminismo kaj Esperanto atingos siajn celojn, “la tutmonda paco estos certigita, kaj ni havos plenan rajton ekkrii kun grandega kaj sincera kontentiĝo: vivu feminismo! vivu esperanto!”.

ab

Vikto - la "lingvo" kun *uj*, *iroj* kaj *inoj*...

Bernard Golden, Hungarujo

En *Sekso kaj Egaleco* (1982, n-ro 10, pĝ 18-24) troviĝas labirinta pritrakto de lingva diskriminacio en Esperanto. Ĉar neniu el la proponitaj solvoj estas centprocente kontentiga, oni emas konkludi, ke vere ne estas solvo. Lingva diskriminacio estas enkonstruita en planlingvoj pro historiaj kialoj, kaj nur ege drasta ago povas devigi uzantojn de Esperanto pensi kaj paroli en nova kadro de substantiva kaj pronoma seks-egaleco. Sed ĉiu elpaŝo en tiu direkto estas tre danĝera, ĉar ĝi kondukos el Esperantujo al Reformujo. Pri tio la plejmulto da esperantistoj preferas lasi sian lingvon netuŝita, Fundamente pura.

Malgraŭ tio, de tempo al tempo aperas sur la horizonto de Esperantujo aŭdaculo, kiu defias konservemajn tradiciojn kaj lanĉas lingvo-projekton, kies celo estas plibonigi Esperanton. Unu el la plej freŝdataj tiaj projektoj (sed certe ne la plej lasta) estas *Vikto*, kies aŭtoro estas Vilmos Bösz el Hungario.

Vikto ne estas ordinara esperantido: unu el ĝiaj elstaraj kvalitoj estas provo forigi seksan diskriminacion per enkonduko de nova (envere tre malnova) sufikso, *-ir*, por indiki masklojn. Zamenhof en la pasinta jarcento okupiĝis pri ĝuste tiu sufikso, kiu devenas de la latina vorto *vir* "viro" senigita je la komenca *v*; sed post iom da pripensado, li opiniis ĝin netaŭga. Apud la seksaj sufiksoj *-ir* kaj *-in* en Vikto estas ankaŭ *-u*, la komunseksa sufikso. Jen ekzemplo:

idu "fil(in)o"; *idir* "filo"; *idin* "filino".

La radiko *id-* havas la signifon "fil-" en Esperanto. Vikto ne havas apartan markilon por substantivoj, kiuj povas finiĝi per konsonantoj. La sufikso *-u* plej verŝajne venas de "-ul" en Esperanto.

Ankaŭ adjektiva radiko estas pluformebla sammaniere:

junu "junul(in)o"; *junir* "junulo"; *junin* "junulino"; *junuj* "gejunuloj".

Ĉar la pluralo de *junu* enhavas la nocion de ambaŭ seksoj, aparta prefikso kiel "ge-" ne estas bezonata.

Originalaĵo en Vikto estas la maniero formi vortojn por "sinjoro" kaj "sinjorino": *su* "sinjor(in)o"; *sir* "sinjoro"; *sin* "sinjorino".

Estas evidente, ke la deirpunkto estas la angla *sir*, vokativo uzata por

alparoli masklojn. Tuthazarde ĝi enhavas la duliteron *ir*, kiun la aŭtoro de Vikto rigardas identa kun la maskla sufikso *-ir*. Li do anstataŭigas ĝin per *-in* por ricevi la vorton por "sinjorino". Sekve de tio, la radiko fariĝas unulitera, *s-*! La pluralo de *su*, *suj*, signifas "gesinjoroj".

Ankoraŭ unu ekzemplo de la mallongigita radiko estas *on-*, la ekvivalento de "onkl-" en Esperanto.

onir "onklo"; *onin* "onklino".

La formo *onu* ne aperas en la magraj vortlistoj ĝis nun publikigitaj, sed ĝi apartenas al la serio kaj ĝia signifo estas evidenta: "onkl(in)o".

La laŭdinda reguleco ilustrita en la ĉi-supraj ekzemploj ne karakterizas la tutan leksikon de Vikto. Antaŭ ol pritrakti neregulaĵojn, ankoraŭ du ekzemploj montras la utilon de la komunseksa substantivo:

gamu "edz(in)o"; *gamir* "edzo"; *gamin* "edzino".

gamendu "fianĉ(in)o"; *gamendir* "fianĉo"; *gamendin* "fianĉino".

Vikto ne estas tute regula aŭ konsekvenca, ĉar ne ĉiuj substantivoj rilatantaj al homoj apartenas al la trisufiksa sistemo. Jen la esceptoj:

hum "homo"; *vir* "viro"; *gin* "virino".

La vorto *gin* devenas de la helena *gynē* "virino", kaj tute hazarde ankaŭ tiu etnolingva radiko enhavas duliteron, kiu identas kun sufikso en Vikto, kaj kies signifo konvenas. *Virgin* aperas en la vortlisto kaj oni emas demandi, kiel Bősz analizas ĝin. Ĉu li ekstraktas la duliteron *-in* por povi formi la serion *virgu* - *virgir* - *virgin*?

parent "patr(in)o"; *pater* "patro"; *mater* "patrino".

papu "patro"; *mamu* "patrino".

paty "paĉjo"; *maty* "panjo".

Influite de la naturalisma skolo de planlingvistiko, Bősz uzas apartajn radikojn por la maskla kaj femala *parent*, tre utila vorto, kiu venas el la angla. Klarigebla estas ankaŭ la *u* en *papu* kaj *mamu*. Tie ĉi ĝi ne funkcias kiel komunseksa sufikso, sed havas la signifon de "ulo" en Esperanto. La radikoj *pap* kaj *mam* indikas la sekson.

frater "anima frato"; *soror* "anima fratino".

puer "knabo"; *muell* "knabino".

mulier "virino", "edzino".

La paro *puer/muell* bezonas klarigon. *Puer* devenas de la latina samforma kaj samsignifa *puer*. "Knabino" en latino estas *puella*, kiu estas kunmetaĵo de *puer* kaj *-la*, la diminutiva sufikso. Bősz prenis tiun vorton, senigis ĝin je la *p* kaj donis al ĝi la *m* troveblan en inseksaj vortoj kiel *mater* kaj

mulier. Ĉu tio signifas, ke *m* povas evolui en Vikto kiel speco de femala sufikso? Ĉu povas esti, ke eĉ en skemismaj planlingvoj kiel Vikto kaj Esperanto, oni tre sentas la bezonon de aparta radiko por kelkaj substantivoj signifantaj masklajn kaj femalajn homojn?

Tio estas la argumento de la naturalisma skolo, kiu eĉ ne toleras parojn kiel "bovo/bovino", ĉar en etnaj lingvoj du malsamaj radikoj estas uzataj. Bestnomoj troveblaj en la vortlistoj de Vikto estas jenaj:

zo "besto"; *kenguruh* "kanguruo"; *ornith* "birdo";
emuh "emuo"; *kolibrih* "kolibro"; *gnuh* "gnuo".

Neniu ekzemplo montras, ĉu ili povas ricevi la masklan kaj femalan sufiksojn. Nu, kiu interesigas pri la sekso de *kenguruh*? Plej verŝajne nur alia *kenguruh*...

Estas ankaŭ vortoj signifantaj homojn, kiuj ne havas genrajn sufiksojn. *Eunuch* "eŭnuko" laŭ difino estas maskla, same kiel *mulier*, *mater* kaj *gin* estas inseksaj. Al la sekvaj substantivoj mankas la *u*-sufikso indikanta komunan sekson:

baeby "bebo"; *theus* "dio"; *infant* "infano";
pojet "poeto"; *minister* "ministro"; *soldat* "soldato";
duktor "gvidanto"; *auktor* "aŭtoro"; *militoer* "militisto";
policoer "policisto"; *nautoer* "maristo"; *missionoer* "misiisto".

Tri vortoj kun la komunseksa sufikso *-u* prezentas problemon: *damu* "damo", same kiel *mamu* "patrino", estas femala, dum *papu* estas laŭ difino maskla.

Analizo de la pronomo-sistemo de Vikto montras, ke ĝi ne estas konsekvenca rilate la forigon de skesa diskriminacio en internacia lingvo:

<u>Singularo</u>	<u>Pluralo</u>
<i>my</i> "mi"	<i>ny</i> "ni"
<i>ty</i> "vi"	<i>vy</i> "vi"
<i>ry</i> "li", <i>sy</i> "ŝi", <i>ly</i> "ĝi"	<i>jy</i> "ili"

Rimarku, ke *ne* ekzistas komunseksa pronomo de la tria persono, kiu respondas al substantivoj kiel *gamu* kaj *hom*. Ne estas indiko, ke *ly* povas funkcii tiucele. Rimarku ankaŭ, ke la triapersona maskla pronomo estas *ry*, kiu tre similas al "ri", unu el la proponoj por la komunseksa pronomo en Esperanto.

Eble tiu ĉi prezentado de la genraj sufiksoj de Vikto pensigos legintojn de la citita artikolo en *Sekso kaj Egaleco*, por ke ili decidu, ĉu estas preferinde serĉi solvon ene de Esperanto mem aŭ ĉu ne estas alia eliro ol drasta reformo de parto de la lingvo mem kun aldono de novaj leksikaj elementoj.